

2/2019

Marto  
Aprilo

ISSN 0032-2431

# Pola Esperantisto

## Revuo de Pola Esperanto-Asocio



- ★ Esperanto en muzeoj?
- ★ Malgranda vilaĝo kun propra lingvo
- ★ Nova monumento al L. Zamenhof en Bjalistoko

## **Pola Esperantisto**

Dumonata revuo de Pola Esperanto-Asocio. Fondita en 1908.

## **Eldonanto**

Pola Esperanto-Asocio  
ul. Gen. W. Andersa 37/59 a  
00-159 Warszawa  
<http://www.esperanto.pl>

## **Ĉefredaktoro**

Robert Kamiński, [rk-lodz@wp.pl](mailto:rk-lodz@wp.pl)

## **Kunlaboro**

T. Nemere, M. Tataro,  
A. Wilkus,

## **ABONOJ**

La abono por 2019 - por 6 numeroj (papera):

Pollando - 50 zlotoj  
eksterlando - 20 eŭroj

Cifereca (pdf)

Pollando - 25 zlotoj  
eksterlando - 10 eŭroj

Pagendaj al la konto:

PL 37 2130 0004 2001 0558 6110 0002  
swift INGBPPLPW

La mendon provizu per informo, al kiu  
adreso estu sendata la revuo.

## **ATENTO**

Abonoj per eŭroj validas post  
aldono de bankaj kostoj.

Polan Esperantiston eblas aboni per

Konto de PEA en UEA: peaa-v;

Detaloj troviĝas ĉe:

<https://uea.org/alighoj/pagmanieroj>

kaj <https://uea.org/alighoj/spagilo>

Presejo

BŁĘKITNE STUDIO

ul. Chopina 6, 44-100 Gliwice

## **Estraro de PEA**

Aleksander Zdechlik - prezidanto

Teruo Matsumoto - vicprezidanto

Robert Kamiński - sekretario

Alina Mozer - kasisto

Agnieszka Mozer - estrarano

Marek Mazurkiewicz - estrarano

## **Ĉefdelegito de UEA**

Stanisław Mandrak:

[stanislaw.mandrak@gmail.com](mailto:stanislaw.mandrak@gmail.com)

## **Peranto de UEA**

Jan Skonieczka: [jaskon@op.pl](mailto:jaskon@op.pl),

Pri la skribitaj artikoloj  
respondecas  
la aŭtoroj mem.

Ricevitajn manuskriptojn  
oni ne resendas.

La redakcio rezervas al si  
la rajton mallongigi  
kaj korekti la tekstojn.

Reproso kaj tradukoj nur  
kun indiko pri la fonto



**Pola Esperanto-Asocio**  
Polski Związek Esperantystów

Fronta kovrilpaĝo - Maria Pokrzywnicka el Toruń

## Enhavo

Redaktoraj vortoj .....	2
<b>Eventoj</b>	
<i>Ewa Caban</i> , Esperantaj renkontiĝoj en Katowice .....	3
<i>Robert Kamiński</i> , Juna Zamenhof denove aŭskultas la voĉojn de Bjalistokanoj .....	5
<i>Anna Laskowska</i> , Du paralelaj Esperanto-ekspozicioj en Lublin .....	7
<i>Robert Kamiński</i> , PEJ renkontiĝis en Łódź .....	8
<i>Maria Pokrzywnicka</i> , Esperanto en muzeoj? .....	10
<i>Fritz Wollenberg</i> , Literatura pikniko en la berlina Zamenhofparko .....	13
<b>Mojose</b>	
<i>www.pej.pl</i> , Ĉefkunveno de PEJ .....	15
<b>Raportoj, rakontoj</b>	
<i>Elżbieta Karczewska</i> , Unu okulo al Maroko .....	15
<b>Pri kio ni aŭdas</b>	
<i>Robert Kamiński</i> , La plej granda aviadilo en la mondo leviĝis en la aeron .....	19
<i>John Moll</i> , Ni havas unuan foton de la nigra truo! .....	21
<i>Ĝoja, ĈRI</i> , Partopreno en nova konkurso por TEO, AMO kaj MONDO .....	22
<i>Bjalistoka Esperanto-Societo</i> , Sekva literatura konkurso en Bjalistoko .....	24
<b>Vizitindaj lokoj</b>	
<i>Magdalena Tatara</i> , Malgranda vilaĝo kun propra lingvo .....	25
<b>Lingvosciencia angulo</b>	
<i>Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko</i> , „La” ĉe propraj nomoj .....	27
<b>Literaturaĵoj</b>	
<i>Roman Dobrzyński</i> , Ĝibulo kaj milicanoj .....	30
<i>Johano Pachter</i> , De Cambodunum al Danubo .....	33
<b>Saĝulaj pensoj</b>	
<i>Anton Oberndorfer</i> , 55-jaruloj estas aparte optimismaj .....	35
<b>Leterkesto</b>	
<i>Wojciech Osimowicz</i> , Aleksander Doba kaj Esperanto .....	37
<b>Kalendaro</b>	37
<b>Oni eldonis</b>	
“Zamenhof w Warszawie” – „Zamenhof in Warsaw”, „Wierszem o Toruniu” – „Verse pri Toruń” .....	40
<b>Forpasis</b>	
<i>Teresa Książek</i> .....	41
<b>El fotogalerio de Andrzej Sochacki</b>	
<i>Andrzej Sochacki</i> , 43-a Internacia Junulara Kongreso en Kraków .....	41



## Redaktoraj vortoj

### Estimataj legantoj

Jen en viaj manoj la sekva numero de Pola Esperantisto, en kiu ni revenas al sciencaj temoj. Nia mondo rapide ŝanĝiĝas kaj ne eblas ekscii pri ĉiuj novaĵoj. Ni volas prezenti al vi kelkajn, laŭ ni gravaj, sciencajn esplorojn kaj atingojn.

La homo estas scivolema kaj volus esplori ĉion eblan. Homoj ankoraŭ ne scias, kiom da novaj sciencaj esploroj estas antaŭ ni. La teorio, kiu klarigus konstruon de la mondo, ŝajnas esti preskaŭ trovebla, tamen, daŭre la plej spertaj sciencistoj ne povas solvi tiun problemon. La universo fascinas kaj en ĝi sciencistoj esperas trovi solvon de multaj sciencaj problemoj. Bedaŭrinde, anstataŭ disvolvi scion, homoj pligrandigas la armeojn kaj perfektigas armilojn.

Espereble, oni komprenos iam, ke scienco kaj scio pli valoras ol milita kaj ekonomia dominado. Nun sciencistoj komencas esplori la universon kaj por tio oni konstruas kosmoŝipojn.

La artikolo pri la plej granda aviadilo montras (ni esperas) komencon de la nova erao en esplorado de la kosmo. Fotoj pri nigraj truoj konfirmas niajn sciencajn teoriojn.

Komprenoble, kiel kutime, ni volas informi vin pri nia “verda mondo”, kiu havas siajn atingojn kaj problemojn. Proksimiĝas Pola Esperanto-Kongreso kaj la elekto de nova estraro. Ni esperas, ke la nova teamo samefike solvados problemojn de ĉiutaga agado. Ni helpu al nia ĉefestraro kaj sentu nin respondecaj pri nia organizaĵo. Ni interŝanĝu informojn pri niaj atingoj kaj fiaskoj. Permesu al Pola Esperantisto esti interŝanĝejo de informoj. Ni legu ilin kaj kreu ilin kune.

*Robert Kamiński*



Ewa Caban

### Esperantaj renkontiĝoj en Katowice

Komence de la ĉijara marto, en Katowice komenciĝis ciklo de dek Esperantaj renkontiĝoj je la komuna nomo „Ekkonu Esperanton”, gvidata de Krzysztof Golwiew kaj mi. Jam de la longa tempo, se mi bone memoras, almenaŭ dum ĉirkaŭ dudek-tridek jaroj, en Katowice ekzistas neniu Esperanta grupo, klubo aŭ amika rondo, kiu renkontiĝus pli-malpli regule.

Kaj jen ekestas la demando: ĉu en Katowice kaj ties ĉirkaŭaĵoj estas nuntempe personoj interesiĝantaj pri Esperanto? Antaŭ nelonge estadis en Katowice Boris Mandirola, la fama -aktivisto kun neelĉerpita vicleco, kiu pasintjare marte inspiris nin organizi renkontiĝon pri Esperanto-movado. Alvenis ĉirkaŭ dek personoj, ĉefe gejunuloj, kaj tiel ekis la ideo organizi E-kurson. La cirkonstancoj favoris. Preskaŭ en la sama tempo, pri la lingvo ekinteresiĝis direktoro de la Regiona Instituto pri Kulturo en Katowice, kaj dank' al lia afableco, la Instituto donis por la kurso ne nur senpagan kaj komfortan lokon en centro de la urbo, sed ankaŭ helpis en reklamado de la evento. Ni, kune kun la direktoro, decidis organizi dek senpagajn renkontiĝojn, celante prezenti regulojn de la lingvo.



La unuan renkontiĝon partoprenis dek ok personoj, inter ili estis ankaŭ esperantistoj, jam uzantaj la lingvon. Mi kaj Krzysztof prelegis pri historio de Esperanto kaj pri valoraĵoj, kiujn donas kono de la lingvo. Ĉiun sekvantan lecionon partoprenis ĉirkaŭ 8-9 personoj. La partoprenantinoj (ĉar alvenas nur virinoj) estas eksterordinare diligentaj kaj lernemaj. Laboro kun tiel bonega kursanaro estas vere plezurdon. Ni evidente klopodas kiel eble plej bone prepariĝi – ni uzas komputilon, projekciilon kaj eĉ... pianon (jen estas bona momento danki al mia kolegino Beata, pro ŝia pacienca akompanado al nia kantado). Preparante nin al la instruado, ni baziĝas je *Esperanto laŭ rekta metodo* de Stano Marček kaj je *1000 stów języka Esperanto* de Edmund kaj Jan Fethke. Legaĵoj devenas ĉefe de *Baza legolibro por komencantoj*, redaktita de Vilmos Benczik.

Kaj kion diras la partoprenantinoj de la renkontiĝoj? Jen kelkaj eldiroj:

„Mi estas ege pozitive surprizita, ke Esperanto estas interesa kaj vivanta lingvo, mi kun granda ĝojo atendas ĉiun sekvantan ĵaŭdon”



Ewa Caban gvidas E-lecionon

„Ĉiuj ĉirkaŭ mi diras, ke lernado de Esperanto estas stranga, sed ĉi tio ne estas vero”

„Mi volas ekkoni Esperanton, por havi kontaktojn kun la tuta mondo”

„Mi kontaktiĝis kun Esperanto antaŭ 30 jaroj. Kiam mi eksciis, ke la Regiona Instituto pri Kulturo en Katowice invitas al Esperantaj renkontiĝoj, mi tre ekĝojis, ke post tiom longa tempo mi povos lerni Esperanton kaj ĉeesti kun Esperanto-parolantoj”

„Mi rekomendas lernadon de Esperanto al ĉiu”.

-----  
*Rimarko de redakcio*

*Laŭ tiu sperto en Katowice videblas, ke meritas kontaktiĝi ankaŭ en aliaj urboj kun kulturinstitucioj, por denove popularigi informojn pri Esperanto. Laŭ lastaj rimarkoj, videble kreskas interesiĝo pri Esperanto. Nur niaj informoj kaj proponoj estu bonnivelaj.*

## Juna Zamenhof denove aŭskultas la voĉojn de Bjalistokanoj

Por festi la 102-an mortodatrevenon de la Ludoviko Zamenhof en Bjalistoko okazis interesa evento.

La 14-an de aprilo, sur la Zamenhof strato proksime al Kosciuszki placo kun ĉeesto de esperantistoj kaj multaj loĝantoj aperis monumento montranta Ludovikon en lia juneco. La ceremonio estis parto de la festo, kiu rememorigas la datrevenon, kiun organizas ĉiujare la Bjalistoka Esperanto-Societo.

„Ludoviko Zamenhof estas konata en la mondo. Li disvastigis la ideon de paco, toleremo, amo, kaj komprenado inter homoj. Li naskiĝis en Bjalistoko kaj la urbo ĝuas tion, kaj ni memoras lin. Ĉi tio estas pruvo, ke la ideoj de Zamenhof vivas en Bjalistoko” - diris la prezidento de Bjalistoko Tadeusz Truskolaski, kiu dimanĉe inaŭguris la monumenton.



Prezidento de Bjalistoko Tadeusz Truskolaski inaŭguras la monumenton

La formo de la monumento estis elektita en konkurso, organizita de la Bjalistoka Urba Oficejo fine de la jaro 2017. Oni decidis prezenti la junan Zamenhof, staranta vizaĝe al la Kościuszki Placo. Ĉirkaŭ ĝi, sur grunde, estas muntitaj pavimeroj kun literoj de la pola, rusa kaj hebrea alfabetoj. La monumenton projektis Katarzyna kaj Ryszard Piotrowski el Varsovio.

„La tuta koncepto sugestis projekti simplan monumenton, kiu montras la junan penseman knabon kiu promenas sur la strato. Disĵetitaj literoj metafore simbolas lingvojn en multkultura Bjalistoko kaj malfacilan komunikadon inter loĝantoj. Ĝi ankaŭ simbolas multajn kulturojn, kiuj inspiris la junan Zamenhof krei internacian lingvon” - diris Ryszard Piotrowski.

La projekto kostis 191 mil zlotojn. Ni memorigu, ke ĝi estas la dua bjalistoka monumento, prezentanta kreinton de Esperanto. La unua, montranta nur lian buston, staras proksime, al Białówny strato

Esperantista festo komenciĝis ĉe la “malnova” monumento al Ludoviko Zamenhof, kie prezidanto de la urbo, esperantistoj kaj lernantoj de bjalistokaj lernejoj metis florojn. Post tio ĉiuj partoprenantoj venis por inaŭguri la novan monumenton. Dum solenaĵo ludis kaj kantis infana ensemblo “*Ukulele donaco*” gvidata de Lech Mazurek. Postagmeze, en la sidejo de BES, okazis prelego de Robert Kamiński pri Zamenhof/Esperanto-Objektoj en la mondo.

Je la 17-a horo en la Centro Ludoviko Zamenhof oni prezentis novan eldonon de la verkita de Roman Dobrzyński libro „Zamenhof w Warszawie”. Ĉifoje la libro aperis en du lingvoj (angla kaj pola).







---

*Anna Laskowska*

## Du paralelaj Esperanto-ekspozicioj en Lublin.



La granda halo de la Ĉefa Poŝtoŝeficejo en Lublin estas ne nur loko por aĉeti poŝtmarkojn aŭ sendi leterojn, sed ĝi ankaŭ estas permanenta loko por filatelaj ekspozicioj, rigardataj ne nur de filatelistoj, sed simple de multaj homoj, aranĝantaj tie siajn aferojn. De la mezo de februaro ĝis la fino de marto 2019, en la Ĉefa Poŝtoŝeficejo estis prezentitaj Esperanto-filatelaĵoj. La ekspozicio konsistis el tri temoj: Esperanto-poŝtmarkoj, eldonitaj en diversaj landoj el ĉiuj kontinentoj de la mondo, memoraĵoj de Internaciaj Esperanto Kongresoj, ofte kune kun kongresaj poŝtmarkoj, glumarkoj kaj kongresaj poŝtstampoj kaj ankaŭ multaj Esperanto-poŝtstampoj, eldonitaj

en Pollando okaze de diversaj E-aranĝoj, aŭ okaze de aranĝoj tute ne ligitaj kun Esperanto, sed skribitaj en Esperanto por reklami nian belegan lingvon en Łódź. En interesajoj de ekspozicio estis, inter aliaj, karto kaj koverto de la jaroj 1922 kaj 1938, de la Unua Esperantista Filatela vendejo en Łódź gvidata de Jerzy Krzyżanowski. Ĉiuj eksponaĵoj devenas el la kolekto de Anna Laskowska.

La dua, paralela ekspozicio pri Esperanto, organizita de esperantisto el Lublino Krzysztof Śliwiński, troviĝas en la Ĉefa Biblioteko de Katolika Universitato en Lublin, kiu posedas grandan kolekton de Esperantaj libroj kaj aliaj Esperantaj eldonaĵoj.



La inaŭguro de la ekspozicio okazis la 21-an de februaro 2019, dum la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo. La ekspozicio estas longdaŭra, planita en 10 partoj, pri diversaj temoj. Ĝis nun estis prezentitaj E-eldonaĵoj el Azio kaj Afriko kaj ankaŭ E-eldonaĵoj de najbaraj landoj ĉe Pollando. Estas planitaj aliaj diversaj temoj kiel: beletro,

vortaroj kaj lernolibroj, literaturo pri E-movado, scienca literaturo, zamenhofologio, promocio de Pollando.

La aŭtoro de la ekspozicio planas donaci ĉirkaŭ 50 librojn al la nuna E-libraro en la Ĉefa Biblioteko de KUL.

---

*Robert Kamiński*

## PEJ renkontiĝis en Łódź

La 29-an de marto, postagmeze, al Łódź venis membroj de Pola Esperanto-Junularo. La kunvenon organizis Małgorzata Sopińska kaj Rafał Mościński novaj junaj membroj de nia filio. La tuta grupo, ĉ. 16 personoj, loĝis en hostelo, ĉe la str. Zamenhofa 13.

La plej interesa estis sabato. Junaj esperantistoj (inter ili unu esperantistino el Bjelorusio) vizitis en nia urbo famajn interesaĵojn: „Blankan Fabrikon” – (eksa fabriko de Ludwig Geyer), la kvartalon *Księży Młyn*, „Lofty Scheiblera” - (eksa fabriko de Karol Scheibler trakonstruita al loĝejdomoj), vilaon de Edward Herbst, pordegon de Ludwik Grohman, Filman Altlernejon (parte), Muzeon de Kinematografio kaj palacon de Karol Scheibler.



Post manĝado en *Manufaktura*, ni promenadis laŭ la str. Piotrkowska al trankotejo ĉe la str. Zamenhofa 13, vizitante „*Trapasejon de Rozo*” kaj serĉante esperantan pavimeron antaŭ la lodza urbodomo. Ni ne sukcesis trovi la bronzan tabulon kun „*Pugo de Tuwim*” kiu, pro renovigado de kortoj ĉe la str. Piotrkowska, ie malaperis.

Poste, en nia renkontiĝejo, ni aŭskultis naŭ interesajn prelegojn. Unu el ili, pri lignaj flutoj, prezentis Marek el Łódź. Li laboras kiel instruisto en muzika altlernejo en Łódź kaj mem bone eklernis Esperanton. Prelegis ankaŭ Robert Kamiński pri Zamenhof/Esperanto-Objektoj en la mondo kaj Zofia Śmistek pri Marek Edelman. Oni devas transdoni apartan dankon al Zofia Barańska, kiu preparis bongustan kukon por partoprenantoj.



Resume, PEJ-anoj estis kontentaj kaj la vizito en Łódź plaĉis al ili. Tra la urbo gvidis nin bona ĉiĉerono, konato de Zofia Śmistek. Inter gastoj estis geedzoj Żebrowski kun du filinoj. La plej juna partoprenantino de la kunveno estis ilia dumonata filino.

Ni finis la bonan sabaton, babilante en biertrinkejo "Z innej beczki", ĉe la str. Moniuszki, kontraŭ la eksa sidejo de PEA en Łódź (ĝis 1998). Gastoj forveturis hejmen dimanĉe.

---

*Maria Pokrzywnicka*

## Esperanto en muzeoj?

En la Etnografia Muzeo en Toruń (Pollando) okazis la unua, oficiala muzea kurso de Esperanto por komencantoj, titolita " Esperanto kunigas homojn kaj kolorigas vivon" Ni invitis junularon kaj plenkreskulojn ekkoni la internacian lingvon, enskribita (2014) sur Polan Liston de Nemateria Kulturheredaĵo. La kurso daŭris 10 horojn, lecionoj okazis kvin foje lunde posttagmeze, en la periodo 11.02.-11.03.2019. La kurson realigis mi - Maria Pokrzywnicka, nun gvidantino de Eduka Fako en Muzeo, esperantistino de multaj jaroj.

Varbante kursanojn, mi uzis multajn argumentojn. Mi substrekis, ke la lingvo Esperanto plifaciligas komunikadon kun homoj en diversaj landoj, ebligas ekkoni ilian normalan, ĉiutagan vivon; ke Esperanto estas por tiuj, por kiuj pli valora estas tio, kio kunigas kaj ne dividas homojn kaj la komunan lingvon ili vidas kiel ŝancon por amikeco. Kiel sekvontan argumenton mi indikis eblecon gimnastiki menson, memoron, koncentradon, kapablecon paroli, kompreni, legi kaj skribi efektive kaj pli

rapide ol en alia fremda lingvo. Krom tio mi parolis, kiamaniere esperantistoj povas plivastigi sian rondon de amikoj, partopreni en landaj kaj mondaj aranĝoj, kongresoj, feriadoj kaj ke, por lerni Esperanton, neniam estas tro malfrue!



En la kurso partoprenis 15 personoj. Ĉiu partoprenanto ricevis atestilon. Plimulto da partoprenantoj esprimis intencon daŭrigi la kurson oktobre. Por organizi ĉi tiun kurseton, instigis min anoj de Toruna Fako de la Pola Turisma Asocio kaj kvin personoj el ĉi tiu grupo restis kursanoj. La kosto de kurso estis 100 zlotoj je 10 horoj. Mi opinias, ke la prezo estis komforta, akceptebla kaj tio helpis decidi pri lingvolernado. Enspezoj ebligis multobligi por ĉiu partoprenanto lecionojn el la lernolibron de Paweł Wimmer “Esperanto en 10 lecionoj”, prepari ankaŭ aliajn helpmaterialojn kaj lernilojn. Gvidante la kurson laŭ la menciita pli supre lernolibro, mi opinias, ke por komencantoj mi bezonus minimume 20 horojn. Mankis tempo por pli intense ekzerci. Ni uzis materialon de la unuaj kvin lecionoj. Mi aprezas tiun lernolibron tre bona, sed laŭ mia sperto, por pli efike instrui, necesus por unu leciono kvar horojn. Miaj lernantoj estis plenkreskuloj, duono eĉ pliaĝuloj. Ili bezonis pli malrapidan instruadon, intensivan ripetadon de gramatikaĵoj kaj vortekzercojn. Mi esperas, ke ili revenos oktobre, por daŭrigi aventuron kun Esperanto.

Pri anonco de la kurso interesiĝis diversaj medioj, i.a. la presa bureo de la Marŝala Oficejo, kiu tre amike priskribis la muzean iniciaton sur sia retpaĝo. Mia komentado por ĵurnalistoj ĉiam indikis Esperanton kiel

rimedo por komunikado sen bariloj, atestita ilo por interkulturaj rilatoj, mensa ludo, servanta por pacemo inter homoj el la tuta mondo kaj diversaj kulturoj, kaj, ne timante la “grandajn vortojn”, kiel eblecon ŝanĝi mondon je la pli bona. Mi estis ofte demandita pri Esperanta kulturo, pri kreanto de la lingvo kaj aliaj famaj esperantistoj, pri la E-movado en la mondo, en Pollando, pri eblecoj de lernado, uzado, precizeco, lingva flekseblo ktp. Mi ofte rakontis pri miaj propraj spertoj kiel esperantistino kaj, precipe, pri la multjara laboro en nia Muzeo por kaj per Esperanto, kiu estas daŭrigo de utiligado de Esperanto por la populariga muzea laboro, komencita kaj gvidata dum 26 jaroj de sinjorino Teresa Nemere – mia Instruistino kaj Amikino.



Ĝojante pri interesiĝo pri Esperantaj aferoj de la lokaj torunaj medioj kaj pri la sukcesa unua muzea kurso, mi pensas, ke mi rajtas proponi al diversaj lokaj Esperantaj grupoj, ne nur en Pollando, provi kunlabori kun muzeoj por praktika popularigado de Esperanto. Eble vi ne sukcesos tuj ion komune organizi, sed muzeanoj aŭdos pri via interesiĝo kaj propono kunlabori. Tutcerte ili konsentos rakonti ion interesan en muzeo por viaj esperantistaj gastoj kun via lingva helpo, eble permesos esperantigi reklamajn materialojn. Vi, esperantistoj, akiros pli vastan vortprovizon pri via loka kulturo, prezentata en muzeo. La muzeanoj ekkonante agadon de la lokaj esperantistoj, pli serioze traktos Esperanton kiel vivantan fenomenon, enskribita sur la landa listo de nemateria kulturheredaĵo. Vi eĉ

deziru popularigon de ĉi tiu kultura fenomeno, naskita sur la pola tero, kreita de Ludoviko Zamenhof, kies nomon portas multaj stratoj en la mondo. Proponu organizi prelegojn, prezentadojn pri Esperanto kaj pri efikoj de la uzado de nia lingvo, kunfaru projektojn, invitu spertajn esperantistojn el nia lando, eĉ el la mondo, se kondiĉoj permesos. Por kapti la plej bonan rilaton kun muzeo en via urbo aŭ urbeto, indas kontaktiĝi kun edukaj fakoj aŭ kun persono, kiu respondecas pri populariga kaj eduka laboro en muzeo. Ja esperantistoj en Pollando ofte kunlaboras kun bibliotekoj kaj kulturdomoj. Mi proponas uzi vojetojn al muzeoj, por atingi bonnivelajn novajn kunlaborantojn, novan kampon por plivastigi la agadon. Ni ĉiuj devas strebi montri Esperanton kiel seriozan servilon por popularigi ideon de amikeco inter homoj kaj kiel rimedon por popularigado, promociado de lokaj valoraĵoj en la mondo tutcerte pli rapide kaj pli vaste ol per la angla lingvo. Ĉio dependas nur de nia aktiveco kaj laboro.

Kiel ni tion faras en Muzeo, bonvolu mem sperti. En la programo de Etnografia Muzeo ekzistas propono por eksterlandanoj, en tio por esperantistoj. Vi povas mendi por grupoj „Renkontiĝon kun la pola popola kulturo”, dum kiu ni alproksimigas tradician vilaĝan arkitekturon, diversajn kutimojn, metiojn, popolvestojn, muzikon, dancojn, kantojn, eĉ manĝaĵojn. Mi elkore Vin invitas ĉiujn polajn esperantistojn, ankaŭ eksterlandajn esperantistajn gastojn, al la Etnografia Muzeo en Toruń, por ekkoni popolan kulturon de la etnaj regionoj Kujawy kaj Pomorze ( Kujavio kaj Pomerio). Krom ekspozicioj en la muzea interno, ni posedas tri interesajn etnografiajn parkojn kun subĉielaj ekspozicioj de vilaĝa arkitekturo. La plej nova rilatas la historion kaj vivon de olendraj setlintoj ĉe Vistulo. Bonvolu viziti ankaŭ nian retpaĝon [www.etnomuzeum.pl](http://www.etnomuzeum.pl)

Kontakto en Esperanto: Maria Pokrzywnicka edukacja@etnomuzeum.pl

---

*Fritz Wollenberg*

## Literatura pikniko en la berlina Zamenhofparko

Dum la paska lundo, la 22-an de aprilo, homoj ĝuis posttagmeze, en la Lichtenberga Zamenhofparko, belan veteron kaj trankvilon de la festotago.

Ankaŭ 18 interesiĝantoj pri Esperanto-literaturo renkontiĝis en la parko. Anna Striganova voĉlegis kaj rakontis siajn magiajn fabelojn, originale verkitaj en Esperanto. Ŝi, en la eldonejo Impeto (Moskvo),

publikigis la tutan serion de fabeloj: *Miraklo de unu momento* (2014), *Fabeloj de la mezepoko* (2015), *Fabeloj pri malicaj estaĵoj* (2016), *Fabeloj pri komenco* (2017) kaj *Fabeloj pri amo* (2018).

Fritz Wollenberg prezentis partojn el la fabeleca rakonto „*Pli ol nura lumo*“ de Sabine Trenner.

Poste oni uzis tempon, por abunde interparoli. Interesaj partneroj por interparoladoj estis ankaŭ niaj gastoj Anna Gamaleya kaj Dima Schewtschenko.





### Ĉefkunveno de PEJ

Ĉi-jare Ĉefkunveno de la Pola Esperanto-Junularo okazos dum tagoj 1-2 de junio, en la sidejo de la Pola Esperanto-Asocio en Varsovio.

9:30 - 13:00 Kunveno: prezento de la jarraporto, resumo de niaj agadoj de pasinta jaro.

13:00 - 14:00 Tagmanĝo.

14:00 - 17:00 Daŭrigo de la kunveno: balotoj kaj elekto de la nova PEJ-estraro, diskutoj kaj planado de venontaj aktivaĵoj, pritrakto de aktualaj temoj.

17:30 - 18:30 Vizito en unu el varsoviaj muzeoj (anoncota).

ĉ. 18:30 vespera malferma renkontiĝo (anoncota).

Ni invitas vin partopreni la kunvenon por kune kun ni plani la agadon por la tuta jaro kaj voĉdoni por elekti la novan estraron.

## Raportoj, rakontoj

*Elżbieta Karczewska*

### Unu okulo al Maroko...

Tiel diris mia patrino, kiam ŝi ne estis kontenta pri mia aspekto: „Unu okulo al Maroko...”. Tiu ĉi afrika lando persekutis min en noktaj sonĝoj kiel io absolute neebla por vidi ĝin propraokule, sed mi ja studis turismon por travivi tion, kio por modesta polo tiutempe estis tro bela por esti reala. Maroko estis la unua afrika lando, kiun mi vizitis.

Ĝia historio komenciĝis en la 4-a jarcento antaŭ nia tempkalkulo, ĉar jam tiam ekzistis tie la ŝtato de berberoj. Danke al francoj mi ne travivis ŝokon post mia alveno al Maroko. Estis ili, kiuj „defendis” la landon dum 44 jaroj, kadre de protektorato, ĝis la jaro 1956. Spurojn de francaj protektantoj oni trovas ege ofte. Por servoj al turistoj, oni ĉefe uzas la francan, ne la anglan lingvon. Turisma informejo en flughaveno,

informtabuloj pri turismaj objektoj, informtabuloj en hoteloj – ĉio estas legebla en la araba aŭ en la franca. France parolas vendistoj sur bazaroj kaj en vendejoj. La reĝo - Muhammed la 6-a - studis komence ĉe la Universitato en Rabat, kie li eĉ doktoriĝis pri juro kaj la duan diplomon de la doktoro pri juro li ricevis ĉe la franca Universitato en Nico. Sciinda estas la fakto, ke la reĝo troviĝas sur la 25-a loko de la listo de 50 la plej riĉaj politikistoj de la mondo.

Agadis – la urbo, kiun ni komence atingis, estis fakte konstruita sur ruinoj post la granda tertremo en la jaro 1960j. Ĝi havas 300 sunajn tagojn dum jaro, kio garantias alvenon de turistoj. Vastaj plaĝoj kaj afablaj marokanoj agas, por ke la pozitiva opinio pri maroka gastamo disvastiĝu en la mondo.



Por atingi Agadiron, de la flughaveno ni vojaĝis tra teritorioj preskaŭ sen verdaĵo. Sur la nuda, ruĝa tero kreskis tie kaj ie etaj arboj aŭ pikaj arbustaroj. Arganaj arboj kreskas en Maroko nur apud Agadir. Pro sekigo de la argana arbo oni punigas mone aŭ eĉ sendas kulpanton al malliberejoj. Sur branĉoj de arboj ofte estas videblaj kaprinoj, serĉantaj rarajn foliojn. Berberaj virinoj bezonas 30 kilogramojn da arganaj fruktoj por metie produkti 1 litron da argana oleo.

Dum nia 7-taga vagabondado kun ĉiĉerono, ni pasis 1700 kilometrojn ĉe Atlantiko, montaroj Atlaso Meza kaj Alta, ni estis en orientmaroka, antaŭsahara regiono. Ni iĝis gastoj de 4-stelaj hoteloj, kie ni admiris

laboron de laboristoj, riparantaj laŭ hejmaj metodoj ĉion difektitan intertempe.

Nia grupo vizitis multajn reĝajn rezidejojn, havantaj eĉ 150 mirindajn ĉambrojn, kaj la plej malnovan universitaton en la mondo, kiu situas en la urbo Fez. Ravis nin „medinoj” – baritaj per muroj, la plej malnovaj kvartaloj en urboj, kie merkatis samtempe eĉ 200.000 vendistoj. Sur deklivoj de montoj, ofte estis legeblaj, pretigitaj el ŝtonoj sloganoj „Dio, patrujo, reĝo”.

Ĉirkaŭis nin koloroj: la ruĝa en Marrakeŝ, pro konstru-materialoj, blua en elementoj de belaĵo de la Botanika Ĝardeno Majorelle aŭ en havenaj stratetoj de fortikaĵoj, ĉe la marbordo, apud Atlantiko. Marrakeŝ estas fama pro tanmetio kaj uzado tiucele kamelan urinon. Kelkaj el la grupo aĉetis belegajn ledajn valizojn, kiuj fiodoris ankoraŭ post la reveno al Pollando. Kolorigejoj de ledoj, kun grandaj kuvoj, plenaj de amoniako kaj koloriloj, aspektis arkaikaj, sed sukcese servis al metiistoj.

Volubilis estas la arkeologia posteno, en la komplekso de ruinaĵoj de la roma urbo Volubilis. Oni supozas, ke Volubilis iam rolis kiel la ĉefurbo de la antikva berbera reĝlando Mauretanio. Tute hazarde, ruinojn ektrovis 2 francaj diplomatoj, en la 20-a j.c. kaj ĝuste danke al ilia iniciativo, hodiaŭ ni povas admiri i.a. mirindajn mozaikojn el la 3-a j.c. aŭ marmorajn restaĵojn de kanaletaro el la 1-a j.c.

Gastigis nin Rabat – la hodiaŭa ĉefurbo de la ŝtato. Iam situis tie Ribit – kie loĝis “frataro”, speciale edukita por batalii kontraŭ hispanoj. En la jaro 1609, al la urbo alvenis la lasta grupo de maŭroj, forpelitaj el Hispanio. Tiam ili kreis marrabistan respublikon, sendependan de la reganta sultano. En Rabat ekzistis eĉ lernejo de marrabistoj.



Ni estis en Essaïra – la urbo projektita de eŭropa inĝiniero kaj kreita en la 18-a j.c., kiel libera haveno por eŭropanoj. Loĝis tie ĉefe portugaloj, same kiel en aliaj urbetoj, kiuj situas laŭlonge de marbordo. Dum longaj jaroj bazis tie marrabistoj.

Kazablanko – komence sur ĝia teritorio troviĝis la berbera urbo Anfa, kiu estis detruita dum la tertremo en la jaro 1755. Oni rekonstruis ĝin kiel Dar – el – Bejda kio signifas „Blanka domo”. Ĉiuj turistoj vizitas tie mirindan moskeon. Sur la artefarita surŝutaĵo sur Atlantiko, fiere suprenleviĝas la moskeo de Hassan la 2-a. Ĝia marmora minareto altas 175 metrojn kaj estas videbla de la maro de 100 kilometroj. La minareto iĝis eksterordinara orientpunkto por maristoj. Super la enirpordego, la sultano ordonis prezenti simbolojn de 3 diversaj religioj: konkon el la katolika pado de sankta Jakobo, hebrean stelon kaj muzulmanan duonlunon. La ĉefa preĝsalono, por 20.000 da preĝantoj, estas 60 metrojn alta. Kovras ĝin la movigema tegmento, pezanta 1500 tunojn. La marmora planko estas varmigita. Flanke de la salono estas specialaj lokoj por virinoj. 80.000 da preĝantoj povas aldone preĝi sur la korto.



Kazablanko esta la plej granda kaj plej moderna urbo de Maroko. Oni taksas, ke loĝas tie (laŭleĝe kaj kontraŭleĝe) ĉirkaŭ 6 milionoj da homoj. Tiuj kontraŭleĝaj loĝantoj ofte loĝas en „bidonvilles”. Imagu la „kvartalon en urbo” konstruita el tabuloj, kartono, ŝtonoj kaj pecoj de lado – por 200.000 loĝantoj. Probable, ĉi tie

naskiĝas la monda terorismo, kiel montriĝo de malespero.

Pro ege densa programo, mi ne sukcesis renkonti esperantistojn en Kazablanko, kvankam mi tion planis.

Maroko, kun kiu mi konatiĝis, ne estis la lando el mia afrika fabelo „Tra dezerto kaj praarbaro”. Manĝante vintre en Pollando ĝardenajn fragojn el Maroko, mi pensis pri la plej granda en la mondo, suna elektrocentralo sur Saharo. Imagu 500.000 kurbigitajn spegulojn altajn je 12 metrojn. Ili staras sur la surfaco de 2500 hektaroj (pli granda ol la tuta ĉefurbo de Maroko).

Mi pensis ankaŭ pri la monumento al nekredible maldika vendisto de la maroka viskio- ege dolĉa, verda teo kun mento. Kontrastoj, kiujn mi vidis tie, estis por mi tute nekompreneblaj kaj pro tio mi revenos al Maroko por konatiĝi kun homoj kaj ilia vivmaniero.

## Pri kio ni aŭdas

Tradukis *Robert Kamiński*

La plej granda aviadilo en la mondo leviĝis en la aeron.  
Ĝi estos uzata por eligi raketojn en spacon

Apartenanta al Stratolaunch Systems Corporation, la plej granda aviadilo en la mondo, leviĝis en la aeron kaj inaŭguris novan eraon de kosmoesplorado. La maŝino ekis la 13-an de aprilo, je la 6:58 horo de la loka tempo (13:58 GMT) de la flughaveno Mojave Air & Space Port. Ĝi estos uzata por porti transportraketojn al alteco de pluraj kilometroj, de kie ili komencos sian vojaĝon en orbiton.



La Stratolaunch-aviadilo Scaled Modelo 351 estis en la aero dum 149 minutoj, do preskaŭ 2,5 horojn. Dum la flugo, pilotoj por la unua fojo havis la ŝancon kontroli, kiel la maŝino estas navigebla en realaj kondiĉoj. Indas noti, ke

malgraŭ tio, ke la Modelo 351 estas ekipita per du fuzelaĝoj kun pilotejoj, nur unu pilotejo estas uzata de pilotoj. En la dua pilotejo troviĝas kontrola elektroniko.

Evan Thomas, la piloto, kiu pilotis la aviadilon la 13-an de aprilo, diris post la provflugo, ke ĉio funkcias laŭ plano, la flugo estis ege bona, kaj la tuta pruvo ĝojigis la teamon. Li ankaŭ rimarkis, ke ĝi ankaŭ estis omaĝo al ĉiuj laborantaj inĝenieroj kaj al aliaj membroj de la grupo, kiuj laboris por ĉi tiu entrepreno dum la pasintaj jaroj.

La Firmao Stratolaunch Systems Corporation estis fondita en 2011, fare de la kunfondinto de Microsoft, Paul Allen. De la komenco, ĝia celo estis krei kaj efektiviĝi novan manieron transporti ŝarĝojn en la spacon. Ĝi devas baziĝi sur aviadilo kaj speciale adaptita raketo, kiu estos sendata en altecon de ĉirkaŭ 11 km, super densaj tavoloj de la atmosfero. Je tiu alteco, post liberigo de teniloj, povos komenciĝi vojaĝo de la veturilo al orbito.

La ebleco tiamaniere meti ŝarĝojn en la kosma spaco praktike sendependigas realigadon de la misio de la veteraj kondiĉoj. Ĝi povas esti ankaŭ pli ekonomia, okaze de la misioj, precipe tiuj kun malgrandaj ŝarĝoj, ĉar aviaĵa brulaĵo kostas malpli ol raketbrulaĵo, kaj la aviadilo povas esti uzata multfoje dum tre mallongaj tempodistancoj.

Ekzistas eĉ pli da avantaĝoj, ekzemple en la elekto de orbito. Ĉiuj avantaĝoj kune faras tiun moveblan transportplatformon kaj la mision pioniraj kaj tre modernaj. La misio, kiu mem prenas raketojn super la plej densajn atmosfertavolojn, estas grava alternativo al la norma startado de veturiloj el la teraj kosmohavenoj.

Tamen, la Scaled Model 351 ne estas rezulto de la laboro nur de la Stratolaunch Sistemo, sed ĉefe de la Scaled Composites, kompanio de Mojave en Kalifornio, kiu ekde la jaro 1983 okupiĝas pri projektado kaj kreado de aviadiloj. Ekzemplo de la plej famaj produktaĵoj de Scaled estis la aviadilo *Voyager*, kiu en 1986 ĉirkaŭflugis la Teron sen reprovizo de aviaĵa brulaĵo.

La kompanio respondecas ankaŭ pri kreado de ŝipoj de SpaceShipOne, ĝis White Knight Two (WK2), mendita de la firmao Virgin Galactic. La konstruita floto devas ebligi spacvojaĝojn por turistoj kiel parto de agado de Richard Branson. Scaled Composites estas parto de Northrop Grumman Corporation, unu el la plej grandaj teknologiaj kaj defendaj kompanioj en la mondo.



Fot. Stratolaunch via Facebook

## Ni havas unuan foton de la nigra truoj!

Ni jam de multaj jaroj atendis, kaj la pacienco valoris. Teamo de esploristoj, kiu laboras en la granda projekto Event Horizon Telescope (EHT), prezentis la unuan en la historio, foton de la nigra truoj. Ĉi tiu foto estas ankaŭ la unua pruvo, konfirmanta la ekziston de tiuj kosmaj objektoj.

La projekto EHT postulis plurajn jardekojn de teoria, observa kaj teknika laboro. Sheperd S. Doeleman, direktoro de la projekto, gvidis internacian teamon, konsistantan el pli ol 200 sciencistoj. Ĝia efektivigo ne eblus sen uzo de moderna teknologio - danke al la kunligita laboro de radioteleskopoj el la tuta mondo, ni ekhavis unu grandan virtualan radioteleskopon je grandeco de la Tero.

La scienca projekto koncentriĝas sur nigraj truoj. En aprilo 2017, la radioteleskopa reto faris observojn de la nigra truoj en la granda elipsa galaksio Messier 87 (M87). Ĉi tiu objekto troviĝas ĉirkaŭ 53 milionoj da lumaj jaroj de la Tero.


Ĉiuj radioteleskopoj kolektis grandegajn kvantojn de datumoj, kiuj estis kolektitaj en specialaj malmolaj diskoj kaj fizike transportitaj al la Instituto de Radioastronomio de Max Planck kaj la Haystack Observatorio ĉe la Massachusetts Instituto de Teknologio en Usono. Ĉi tiuj datumoj estis analizitaj per specialaj superkomputiloj kaj nun ni povas vidi la efikojn de la laboro.

La bildo montras la "ombron" de la nigra truoj, kiu estas 40 miliardojn da kilometroj larĝa, kaj la eventa horizonto estas ĉirkaŭ 2,5 fojojn pli malgranda. Surbaze de la observoj, oni konstatis, ke la nigra truoj en la galaksio M87 turniĝas laŭ la horloĝa direkto. Plie, estis ankaŭ eble kalkuli la mason de la nigra truoj. Ĉi tiu maso egalas al 6,5 miliardoj da teraj masoj.

Kadre de la projekto Event Horizon Telescope oni faris observojn ankaŭ de la nigra truoj Sagittarius A\*, kiu situas en la centro de la Lakta Vojo, 26,000 lumjaroj de la Tero kaj havas mason de 4,3 milionoj da masoj de suno. Ni devas ankoraŭ atendi la foton de la "ombro" de tiu nigra truoj, ĉar la superkomputiloj ankoraŭ prilaboras la akiritajn informojn.

Do ni havas la unuan pruvon pri ekzisto de la nigraj truoj. La tuta nia scio pri tiuj grandaj nigraj monstroj devenas de fenomenoj, kiujn ni

observas en ilia ĉirkaŭaĵo. La EHT-projekto plu daŭros - en la sekvaj jaroj estos alligitaj pliaj radioteleskopoj kaj ni povos fari sekvajn observojn, dank' al kiuj ni povos pligrandigi nian scion pri la nigraj truoj.



Bildo de la nigra truo en la galaksio M82 - fonto: Event Horizon Telescope Collaboration

fonto: <https://eventhorizontelescope.org/>

---

*Ĝoja, Ĉina Radio Internacia*

## Partoprenu en nova konkurso por TEO, AMO kaj MONDO,

Esperantistoj kaj te-ŝatantoj!

**Kontribu en la konkurso per fotoj kaj video fimetoj! Eksponu fotojn kaj videofimetojn!** Tianjin-a Esperanto-Asocio, kiu gajnis premion en la dua filmkonkurso "Teo kaj Amo", Asocio por Popularigo de Hangzhou-urbo kiel Te-urbo, kiu kunlabore kun ĈRI lanĉis kaj sukcese organizis du filmkonkursojn "Teo kaj Amo", (ĉina tekultura profesiulo Wang Xufeng



estas ĉefo de la Asocio), kaj Tianjin-a Universitato de Scienco kaj Tekniko nun lanĉas novan konkurson por Teo, Amo kaj Mondo.

Ni celas per tiu ĉi nova ago plivastigi Esperanton, amikiĝi kun teŝatantaj esperantistoj kaj teaj profesiuloj kaj per fotoj kaj videaĵoj pere de TEO montri diferencojn kaj similecojn de nia mondo.

### **1. Kontribuu per fotoj kaj videaĵoj:**

**Temo: TEO, Enhavo: libera, Tekniko: Libera**

**Lingvo: Esperanto** (akompano de nacia lingvo estas bonvena)

**Fotoj:** Fotu interesajn okazojn, eventojn, personojn, vidindaĵojn, konstruaĵojn...pri TEO, skribu nomon, lokon, informon pri fotita persono (se estas iu sur la foto) kaj rakontu pri via foto. Ne estas limo por la longeco de la rakonto.

Estas bonvenaj fotoj **individue kaj grupe**, vi rajtas sendi maksimume 10 individuajn fotojn, aŭ/kaj maksimume 2 grupojn de fotoj; kaj se vi sendos grupojn, ĉiu grupo inkludu minimume 2 kaj maksimume 10 fotojn. Estas bonvenaj fotoj nigroblankaj kaj koloraj. Ĉiu foto havu almenaŭ 3 MB en la formato JPG.

### **Videofilmetoj:**

Longeco inter 30 sekundoj kaj unu minuto. Sen dialogo, sen subtitoloj, nur videofilmeto. Formato MPG, MPEG-4, WMV, AVI, MP4, MOV, 1920x1080p., 16:9, 25Mbps.

**Limdato: la 30-a de junio, 2019.**

Al retadreso: foto2019@qq.com bonvolu sendi:

(1) via(j)n kontribuaĵo(j)n;

(2) vian vivresumon (ĉirkaŭ 500-vortoj longa) kaj viajn 2 fotojn (unu horizontala 3264x2488p, kaj unu vertikala 2488x3264p, en formato JPG, almenaŭ 2MB-granda)

(3) viajn retadreson, poŝtadreson kaj telefonan numeron

(4) skribu atestilon pri kopirajto kun via subskribo kaj dato, ekz:

*Mi certigas, ke la verko estas originala, ke mi havas ĉiujn rajtojn pri ĝi kaj ke ĉiuj informoj pri ĝi estas veraj. Mi certigas, ke ;*

*- La kopirajto pri la muziko estas certigita por publika uzo.*

*- La personoj en la verko permesis ĝian uzon por publika prezento.*

*- La faranto garantias, ke li havas ĉiujn necesajn permesojn kaj rajtojn kaj ke neniu rajto de aliaj personoj estas lezita.*

*- Post la ago, la verkoj estos libere uzablaj de ĉiuj sub la "Creative-Commons-Licence (CC-BY)". Subskribo Dato*

**Donaco:** Profesiuloj pri teo kaj fotado elektos 200 elstarajn fotojn kaj 20 brilajn videaĵojn por sekvaj ekspozicioj.

Aŭtoroj de tiuj kontribuajoj ricevos libron pri teo: *Teo kaj Amo: Rakonto pri Teo*, aŭ, *Rakontoj pri Ĉina Teo*, (La libroj estos vendataj en la libroservo dum UK en Lahtio).

Ĉiuj partoprenantoj ricevos dankleterojn en Esperanto kaj en la ĉina lingvo.

## 2. Eksponu fotojn kaj videaĵojn

Ni eksponu la kolektotajn fotojn kaj videaĵojn tra la mondo ekde septembro 2019. Estas bonvena via aliĝo. Ni liveros al vi fotojn kaj videaĵojn per interreto kaj vi aranĝos ekspozicion en sidejo de via asocio, muzeo, librovendejo, biblioteko, te-trinkejo, te-fabrikejo, lernejo, ktp.

Estas oportuno reklami nian lingvon kaj nian movadon, ĉu ne?

Do AGU!!!

Ni pretas respondi ĉiujn demandojn per la retadreso foto2019@qq.com, Han Daqiang 13902025740@139.com, Lin Lisha (Lisa) 65202258@qq.com, Zhang Ping (Ĝoja) perfectgoja@163.com

Ni atendas vian aliĝilon!

Tianjin-a Esperanto-Asocio, Asocio por Popularigo de Hangzhou-urbo kiel Te-urbo, Tianjin-a Universitato de Scienco kaj Tekniko

Aldone sendu plenigitan aliĝilon kun: sia nomo, lando, urbo, organizaĵo, retadreso, telefona numero, fizika adreso. Bonvolu ankaŭ signi kiamaniere vi volus helpi al ni. Jen tri eblecoj:

Mi volas diskonigi vian agon!

Mi volas kontribui per fotoj aŭ videaĵoj!

Mi volas organizi ekspozicion en mia loko.

<http://esperanto.cri.cn/2521/2019/04/02/165s204428.htm>

---

*Bjalistoka Esperanto-Societo*

## Sekva literatura konkurso en Bjalistoko

Podlaĥia Libraro - Łukasz Górnicki en Bjalistoko kaj Bjalistoka Esperanto-Societo anoncas la 9-an literaturan konkurson „Esperanto ligas homojn” por rakonto sub la titolo „**Mi estas civitano de la mondo**”. La regularon vi trovos ĉe [www.espero.bialystok.pl](http://www.espero.bialystok.pl). Scio estas baro, kiu gardas nin kontraŭ abundo de stulteco. Dividu kun ni viajn opiniojn pri la mondo.

Magdalena Tatara

### Malgranda vilaĝo kun propra lingvo

Wilamowice estas malgranda vilaĝo, situanta ĉe limo de du polaj regionoj: Śląsk (Silezio) kaj Małopolska (Malgrandpolujo). Loĝas tie nur tri mil personoj. Ŝajnas, ke la urbeto estas sama kiel aliaj en la regiono, tamen ĝi havas ion, kion aliaj ne havas: tio estas la propra lingvo. Ankoraŭ antaŭ la dua mondmilito, la loĝantaro uzadis sian propran lingvon, nekomprenblan por loĝantoj de aliaj najbaraj vilaĝoj. Iuj pensis, ke tio estas la flandra lingvo aŭ iu dialekto de la germana, sed vere tio estas aparta lingvo. En Wilamowice ne nur lingvo estas aparta sed ankaŭ riĉaj kutimoj kaj tradicioj.

Laŭ historiistoj, la vilaĝo estis fondita en la 13-a jarcento de alvenintoj de la okcidenta Eŭropo, kies deveno ne estas bone konata. Oni supozas tamen, ke ili alvenis el la regiono ĉe la landlimo de hodiaŭa Germanio kaj Nederlando.

Ili alportis siajn tradiciojn kaj vestiĝmanieron. Ekzemple, virinoj portadis subtile teksitajn ĉapelojn kaj kaptukojn, riĉajn ruĝajn bidarojn kun arĝentaj krucoj.

La loĝantaro de Wilamowice okupiĝis ĉefe pri teksado kaj komerco. Belegajn manornamitajn teksaĵojn ili vendadis en la tuta Eŭropo kaj dank'al tio ili pliriĉiĝis rapide. Pro tio ili povis aĉeti sian sendependecon, komence de la 19-a jarcento, kaj en 1818 la vilaĝo ricevis urbrajtojn. Dank'al la riĉeco la urbanoj havis eblecon vojaĝi kaj studi eksterlande, do la komunumo iĝis tre edukita kaj malfermita al la mondo. Gravan rolon ludis tie virinoj, kiuj mastrumis la domojn dum vojaĝoj de viroj.



Post la dua mondmilito, dum la komunista reĝimo, la komunumo de Wilamowice estis persekutita. Oni malpermesis porti la tradician vestaĵon kaj kultivi kutimojn. Iuj estis forpelitaj el siaj domoj. Pro tio, ke la loka



lingvo estis simila al la germana, la lingvo de antaŭnelonga okupanto, estis malpermesite paroli ĝin. Pro tio la lingvo, la tradicia vestmaniero kaj la lokaj kutimoj malaperadis.

Post la falo de komunismo, la situacio ne multe ŝanĝiĝis. La lingvon parolis nur la

plej maljunaj loĝantoj, kiuj memoris la antaŭmilitan periodon. Pri la tradicioj preskaŭ neniu memoris.

Feliĉe nun estas kelkaj junaj loĝantoj, kiuj denaske parolas la lingvon kaj volas revivigi ĝin. Bona ekzemplo estas Tymoteusz Król, naskiĝinta en 1993, kiu eklernis la lingvon dum infanaĝo, kiam li ofte restadis kun najbarino, kiu okupiĝis pri li. Por li ĝi iĝis la unua kaj denaska lingvo kaj tiam li konis ĝin pli bone ol la polan. Kiam li estis 10 jara, li vere ekinteresiĝis pri la lingvo, li komencis surbendigi konversaciojn en la lingvo de Wilamowice. Tiamaniere li kolektis ĉirkaŭ mil horojn de registraĵoj, kiujn li poste transskribis, listigis kaj tradukis. Li ankaŭ iniciatis registradon de la lingvo en la Biblioteko de Usona Parlamento en 2007. La lingvo estas ankaŭ agnoskita de UNESCO. Nur dank'al junaj entuziasmuloj la lingvo kaj la kutimoj de Wilamowice havas eblecon travivi. En la vilaĝo estis kreitaj dancensembloj, rondo de la kulturo de Wilamowice kaj okazadas diversaj aranĝoj, promociantaj la lingvon kaj la kulturon. En lernejo infanoj povas lerni pri tio.

Kun la komunumo de Wilamowice kunlaboras sciencistoj el la fakultato de "Artes Liberales" de la varsovia Universitato. Estas preparataj instrumaterialoj, lernolibroj kaj vortaroj. Dank'al tio, la tradician lingvon de Wilamowice oni povas lerni ankaŭ en la pola ĉefurbo.

Loĝantoj de la urbeto bone agadas por savi la kulturon de Wilamowice kaj ili strebas havi apogon de politikistoj, por ke la lingvo ricevu statuson de regiona lingvo. Tiu statuso permesus eble al revivigo kaj disvolvigo de la lingvo. Se ne, ĝi restos nur lingvistika kuriozaĵo.

## „La” ĉe propraj nomoj – dua parto

### Klasikaj religiaj verkoj

Ĉe la nomoj de iaj gravaj klasikaj religiaj verkoj oni ofte uzas *la*, ankaŭ kiam ne ĉeestas rekta priskribo, kvazaŭ tiuj nomoj estus ordinaraj O-vortoj: *la Biblio* (aŭ *La Sankta Biblio*), *la Korano* (aŭ *La Nobla Korano*), *la Talmudo* k.a. *La Kristaneco montris al li en **la Biblio** la konsolon pri eterna vivo. Ĉu ne tiel estas skribite en **la Korano**?* Sed tute ne estas eraro uzi tiujn nomojn sen *la*.

Noto: Simile oni uzas la nomojn de la ne-religiaj verkoj *Odiseado*, *Eneado* kaj *Iliado* kun *la*: *la Odiseado*, *la Eneado*, *la Iliado*. Sed baze tiuj vortoj estas ordinaraj O-vortoj. Ili estas (iom kuriozaj) kunmetaĵoj kun la sufikso AD: *Odiseo* (propra nomo de persono) + AD → *odiseado* (vojaĝo de Odiseo) → *la Odiseado* (nomo de rakonto pri lia vojaĝo).

### Ordinaraj O-vortoj kiel propraj nomoj

Antaŭ ordinaraj vortoj, kiuj fariĝis propraj nomoj, oni normale ja uzas *la*, ĉar la vortoj ne per si mem montras unikaĵojn:

- *Li kreis **la Grandan Ursinon**, **Orionon**, kaj **Plejadojn**.* Estas tri propraj nomoj de stelaroj. Ĉiuj tri estas egale unikaj. La du lastaj nomoj estas normalaj propraj nomoj, kaj ne havu *la*. La unua nomo tamen konsistas el ordinaraj vortoj, kaj bezonas *la*.

- *Kaj tiam **la Nokto** diris: “Tenu vin dekstre kaj eniru en la malluman pinarbaron, mi vidis, ke tien foriris **la Morto** kun via malgranda infano.”* La nokto kaj la morto rolas en fabelo kiel personoj kun propraj nomoj (tion montras la majuskla skribo), sed *nokto* kaj *morto* estas ordinaraj O-vortoj, kaj tial bezonas *la*.

- *En unu el la domoj de **la Orienta strato** en Kopenhago, proksime de **la Nova Reĝa Bazar**o, estis iam granda gastokunveno.* Estas du propraj nomoj, kiuj konsistas el ordinaraj vortoj. Ili havas *la*. La tria nomo, *Kopenhago*, estas normala propra nomo. Ĝi ne havas *la*.

- *Dio kondukis la popolon ĉirkaŭire [...] al **la Ruĝa Maro**.* La marnomo konsistas el ordinaraj vortoj.

- *La plej suda parto de la Afrika kontinento estas **la Bonespera Kabo**.*

Okazas tamen, ke oni forlasas *la* ĉe tiaj ĉi nomoj, precipe kiam temas pri tre konataj nomoj. La uzado ne estas tute unueca:

- *Ĉu vi estas membro de (la) Universala Esperanto-Asocio?* Oni povas uzi *la*, sed normale forlasas ĝin ĝuste ĉe ĉi tiu nomo, ĉar ĝi estas tiel konata. Mallongigojn de tiaj nomoj oni tamen plej ofte uzas sen *la*.

### Multe-nombraj nomoj

Propraj nomoj, kiuj havas jam en sia baza formo J-finaĵon, ofte kondukas kiel ordinara O-vortoj (kun *la*), ankaŭ kiam fakte temas pri normala propra nomo: *la Alpoj* (montaro en Eŭropo), *(la) Andoj* (montaro en Sud-Ameriko), *(la) Filipinoj* (insulara ŝtato en Azio). La vorto *alpo* (= “alta monto kun paŝtejoj”) estas ordinara O-vorto. Tial *la Alpoj* estas tute normala: **La Alpoj** *ŝajnis al li kvazaŭ la kunmetitaj flugiloj de la tero*. La vorto *Andoj* estas tamen ĉiam propra nomo, sed pro la J-finaĵo oni iel sentas, ke ĉiu unuopa monto devus esti “ando”. Tial oni emas uzi *la*, kio estas akceptebla, kvankam la vorto *\*ando\** ne ekzistas. Same estas pri *la Filipinoj*, kie la J-finaĵo kreas la impreson, ke ĉiu insulo estas “filipino”, sed tia vorto ne ekzistas.

### Propraj nomoj kiel priskriboj

Kiam propra nomo aperas kiel postmetita identiga priskribo de ordinara O-vorto, kaj la tuta frazparto estas laŭsence difinita kaj konata, tiam oni devas uzi *la*, ĉar la ĉefvorto de la tuta frazparto estas ordinara ne-propranoma O-vorto:

- *la rivero Nilo*
- *la fama aŭtoro Ŝekspiro*
- *la strato Graniczna*M.4
- *la monato Majo*

Ordinare la ĉeesto de propra nomo estas sufiĉa kialo por diri, ke temas pri io difinita kaj konata. Sed eventuale, se oni volas diri, ke estas unu el pluraj kun tiu nomo, kaj se la aŭskultanto ne scias, pri kiu el ili temas, tiam oni eble povas uzi tiajn esprimojn sen *la*: *Mi vojaĝis kune kun amiko Johano*. = ...*kun amiko, kiun vi ne konas, sed kiu nomiĝas Johano*. Praktike oni tre malofte tiamaniere uzas propranoman priskribon ĉe O-vorto sen *la*. Pli ofte oni diras ekz. ...*kun amiko, kiu nomiĝas Johano*, ĉar tio estas pli klara.

Tia propranoma priskribo povas ankaŭ havi la formon de A-vorto:

- *la Mediteranea maro* = *la maro, kiu nomiĝas Mediteraneo* = *la maro Mediteraneo* = *Mediteraneo*. La longa esprimo *la Mediteranea maro* estas do tute samsignifa kiel simpla *Mediteraneo*. La longa esprimo povas esti utila, ekz. kiam oni volas aparte atentigi, ke Mediteraneo estas maro.

- *la Jutlanda duoninsulo* = *la duoninsulo Jutlando* = *Jutlando*

- *la Atlantika oceano = la oceano Atlantiko = Atlantiko*
- *la Esperanta lingvo = la lingvo Esperanto = Esperanto*

Ial oni neniam uzas nomojn de homoj en tia maniero. Anstataŭ *la aŭtoro Ŝekspiro* oni neniam diras *\*la Ŝekspira aŭtoro\**.

### **Titoloj**

Vortojn kiel *sinjor(in)o, fraŭl(in)o, doktor(in)o, profesor(in)o* k.s. oni ofte uzas antaŭ propra nomo de persono. Laŭ la ordinaraj reguloj, oni tiam uzu *la*, ĉar la tuto estas klare difinita per la propra nomo:

- *La oficejo de la sinjoroj Snitchey kaj Craggs kuŝis tre oportune sur la foirejo. = ...de la sinjoroj, kiuj nomiĝis Snitchey kaj Craggs...*

- *La doktoredzino A. vizitis hodiaŭ la gedoktorojn*
- *La reĝo Johano legis en la romano pri la reĝo Arturo.*

Sed kelkaj tiaj antaŭesprimoj ofte uziĝas kvazaŭ parto de la propra nomo, kaj tiam ne vere informas, kia estas la persono. Ili uziĝas pli-malpli rutine pro ĝentileco, respekto aŭ simile. En tiaj okazoj oni ofte forlasas la artikolon:

- *Li fianĉiĝis kun fraŭlino Berto.* Oni ankaŭ povas uzi *...kun la fraŭlino Berto*, sed tiam la vorto *fraŭlino* farĝas pli grava, pli informoplena.

- *Sinjorino Zminska hieraŭ multe parolis al mi pri vi.*

- *Sekve barono Brambeus estas vi?*

- *Se nun troviĝus tiaj reĝoj, kiel reĝo Arturo, tiam troviĝus ankaŭ tiaj kavaliroj, kiel sinjoro Tvent kaj sinjoro Gaudian.*

- *Fraŭlino Klara kaj fraŭlino Kristino ne povas plenumi la tutan kudradon.*

Ankaŭ la vorton *numero* oni ofte uzas en tia titoleca maniero sen la antaŭ numeroj: *Li loĝas en (ĉambro) numero 110 (= cent dek). Ĉu vi legis numeron 12 (= dek du) de tiu gazeto?*

Se titoleca antaŭesprimoj havas rektan priskribon, ekz. A-vorton, tiam oni ordinaro ja uzas *la*: *Plej afable brilis la okuloj de la filino, la ĉarma fraŭlino Klara. Li fianĉiĝis kun la juna fraŭlino Berto. La genia doktoro Zamenhof kreis Esperanton. Ĉu vi legis la interesan numeron 100 de tiu gazeto?*

Se temas pri la frazrolo alparolo, oni nepre ne uzu *la* antaŭ titolo: *Sinjorino Szejc! – ŝi diris, – mi prezentas al vi sinjorinon Marta Swicka. Kara fraŭlino Klara, – ŝi diris, – vi scias bone, kiel mi zorgas pri la sano de miaj laborantinoj.*



Roman Dobrzyński

### Ĝibulo kaj milicanoj

Estas la jaro 1970, junia posttagmezo. Mi eliras el la redakcio tre laca kaj frontas la urbocentron tiel varmegan kiel ŝtalfandejon. Sur la placo de Varsoviaj Ribelantoj, kie mi kutime parkumas mian aŭton, troviĝas eĉ ne unu veturilo. Do ankaŭ mankas la mia! *Oni ŝtelis mian aŭtomobilon!* Mi krias al la preterpasanta milicano, sed li ignoras mian veon, ĉar ĵus finiĝis lia deĵora tempo, kaj konsilas min iri al la proksima milicejo ĉe la strato Wilcza. Mi panike kuras, ja temas pri la ŝtelo de mia trezoro. Aŭtomobilo! Tiutempe la kvarrada motorveturilo estis revo de ĉiu pola viro, ĝenerale neatingebla pro altega prezo. Aŭtomobilo kostis same kiel loĝejo. Mi estis feliĉa posedanto de Volkswagen, nomata en Germanio mallonge - VW aŭ karese - skarabo, kaj en Pollando - ĝibulo. Mia ĝibulo estas ŝtelita!

Tragedio!!!

Mi kuras al la milicejo esperante, ke mia aŭto kun la ŝtelisto ĉe ĝia stirilo estos kaptita. La funkcio de la milico estas forte fiksita en mia subkonscio. Ja mi apartenas al la generacio instruita pri la diferenco inter milico kaj polico. La polico estas instrumento de perforto, kiun kapitalistoj uzas por ekspluati

laboristan klason, dum la milico ekzistas nur en socialismaj landoj kaj ĝia tasko estas protekti kaj servi la popolon. Ĝuste tion mi - popolano bezonas, kaj rapidas direkte al la strato Wilcza. Ne timigas min ĝia nomo - la Lupstrato.

Ĉi-loke mi sentas la neceson rompi mian rakonton per jena glosa. Tiutempe la milicanoj, spite sian ofereman servon al la popolo, estis por la sama popolo objekto de moko. Jen kelkaj ekzemploj: *Kial milicanoj patrolas la urbon duope? Ĉar unu scipovas skribi kaj la alia - legi.* Post kelka tempo oni rimarkis, ke la patroladon faras triopo da milicanoj. *Kial estis aligita la*





*tria? Por spioni intelektulojn. Centoj da tiuspecaj spritaĵoj pri milicanoj cirkulis en Pollando. Ilia enhavo similis al tiuj, kiujn francoj disvastigas pri belgoj, brazilanoj pri portugaloj aŭ usonanoj pri poloj ktp. Ĉiukaze temas pri stulteco. Foje estis lanĉita „la lasta ridindaĵo pri la milico”. Ĝi koncernis la Milican Akademion en la urbo Szcztytno. Ĝiaj sciencistoj ricevis la taskon esplori tiun ĉi socian aferon. Ili longe faris sian laboron kaj rezulte prezentis jenan konkludan raporton: *La fenomeno ne estas danĝera laŭ la politika vidpunkto, ĉar el la kvar miloj da analizitaj spritaĵoj nur tri estas kompreneblaj.**

Ŝvitite mi enkuras la milicejon ĉe la strato Wilcza kaj laŭtvoĉe prezentas mian tragedion. Sed deĵoranto en akceptejo tute ne kompatas min, nur ordone montras seĝon. Mi sidigas kaj per okuloj de mia imago

sekvas la ŝteliston, kiu kun mia ĝibulo fuĝas ĉiusekunde pli malproksimen. Ho, li ie/tie rapidas, dum ĉi tie neniuj urĝas! Fine oni vokas min al la ĉambro numero 6. Mi enkuras kiel rakedo, kun malfermita buŝo, sed la milicano, sidanta ĉe sia skribotablo, silentigas min geste, montras



seĝon por mi, kaj komencas sian burokratan proceduron: *Familia nomo, persona nomo, naskiĝdato, loĝadreso, patro, patrino, avo, avino ktp.* Dum li malrapide daŭrigas la enketadon eĉ pri la numero de miaj ŝuoj, mi image vidas mian aŭtomobilon foriĝi po centkilometrojn hore.

La suboficiro – tion pruvas liaj epoletoj – elĉerpinte la liston de rutinaj demandoj, ankoraŭ avertas min pri punoj pro falsa atestado, kaj finfine demandas pri la celo de mia vizito. Mi nerveze rakontas pri la frumatena veno al mia laborejo per aŭtomobilo, ĝia parkumo sur la placo de Varsoviaj Ribelantoj... La suboficiro haltigas mian paroltorenton, starigas akcesorajn demandojn kaj permane, malrapide priskribas la okazintaĵon. Liaj sulkoj sur la frunto kaj grimacaspekta vizaĝo konfirmas la penon de tiu ĉi intelekta laboro. Kiam li finas, ŝajnas al mi, ke mia aŭtomobilo jam troviĝas 100 kilometrojn for. La verkinto de la protokolo transdonas ĝin al mi por atenta tralego kaj subskribo.

Mi prenas la folion kaj komencas legi. Ĝia enhavo, kvankam skribita permane, estas facile legebla kaj komprenebla. Nu, kiel profesia redaktoro mi emas korekti kelkajn malglataĵojn, sed rezignas pri tia senanimeco, ĉar la protokolo sufiĉe klare prezentas mian plendon. Tamen fininte la legadon de la protokolo kaj subskribinte ĝin, mi spontane... ekridas. La milicano reagas per abrupta kolero, li imputas al mi skandalan konduton en la ŝtata oficejo. Strange! Li miskomprenis mian ridon kiel mokon pri la milicista stulteco, dum mian humoron instigis tute alia cirkonstanco. Mi subite rememoras, ke tiun ĉi tagon mi ne uzis aŭtomobilon, sed ... tramon.

Jen la proverba pendiĝo inter martelo kaj amboso. Senvualigi la veron egalus konfesi la falsecon de mia atesto, kio ja estas punenda. Kion fari? Vidante la kolere ruĝan vizaĝon de la milicano, kiu krake fermas tirkeston kun la protokolo, mi poltrone adiaŭas lin kaj fuĝas. Reveninte hejmen, mi ne plu dubas, ke mia „ŝtelita” aŭtomobilo finos sian aventuron en rubujo. Tamen ekminacis alia danĝero. Kion diri, kiam la „gardantoj de la popolo” retrovos min en tiu ĉi aŭtomobilo? Sed okazis nenio plu. La milicano tutcerte venĝis kontraŭ mi kaj ne iniciatis inkvizon.

Du jaroj pasis trankvile kaj tamen refreŝiĝis rilatoj de mia aŭtomobilo kun milicianoj. Mia familio decidis vendi la veteranan ĝibulon. Ni veturis al aŭtomerkato, kiu situis sur la vastega ebenaĵo de la ĵus likvidita militista aerodromo Bemowo. La renoma marko Volkswagen logis multajn klientojn kaj nia veturilo rapide ŝanĝis proprieton. Li estis milicano, kvankam civile vestita. Tio montriĝis dum subskribado de vend-aĉeta kontrakto. Jam kiel ŝoforo de sia auto li afable reveturigis nian kvaropon al nia hejmo ĉe la strato Garwolińska. Tie ni mansvinge adiaŭis nian ĝibulon kaj ĝian novan posedanton. Por ĉiam?

Post kelkaj monatoj aperas en nia loĝejo neatendita gasto facile rekonebla kiel la aĉetinto de nia aŭtomobilo. Stranga afero! Mi ne kaŝas mian teruron. Kio okazis? La milicano trankviligas min per amika gesto. Mia edzino Erika invitas lin internen: teo, kukoj, cigaredoj ktp. La tuta familio, inkluzive de la gefiloj Feliks kaj Ewa sidiĝas ĉe la tablo kaj la milicano serioze proklamas, ke la ĝibulo ne plu ekzistas pro horora akcidento. *Mi ŝoforis – li diras - sed okazis al mi nenio malbona, ĉar savis min sekurrimeno. Ĝuste mi vizitas vin, por danki pro la fakto, ke vi vendis al mi la aŭton kun instalita sekurrimeno.*

Necesas klarigi, ke tiutempe en Pollando sekurrimenoj ne estis konataj, nia ĝibulo apartenis al esceptaj kazoj. Feliks, tiam la kvinjara entuziasmulo pri aŭtomobiloj, scivolas pri la kialo de la akcidento. La saviĝinto konfesas, ke temas pri la klasika tragikomedio. Ĝus li aĉetis elegantajn ŝuojn. Veturante sufiĉe rapide, li klinis momente la kapon, por aprezi ilian belecon. Sufiĉis sekundoj: Kurbo! Arbo! Frapo!!! Sed la fino estis feliĉa. Danke al la rimeno. Anekdotoj pri milico finiĝis, ĉar anstataŭis ĝin polico. Malpli ridinda?

## De Cambodunum al Danubo.

Post studado, pro laboro, mi ekloĝis en Cambodunum en Algovio (germane Kempten im Allgäu), la plej malnova urbo de Germanio, fondita de romianoj samtempe kun Trevira (Trier) kaj Kolonio. La rande de Bavaraj Alpoj situanta urbo estas ĉirkaŭata de montaraj arboj. Meze de tiuj arbaroj mi ekdeĵoris kiel arbaristo kaj loĝis for de civilizacio en malnova, ligna kabano de iama ĉasisto. Tamen, mia oficejo estis en urbo kaj estis ekipita per ĉiuj siatempaj modernaj instalaĵoj, kiel centra hejtado, telefono, fakso (komputiloj ankoraŭ ne ekzistis).

Male ol en mia oficejo, en la kabano ne estis kurento, sed kandeloj kaj gazlampo. La akvon mi portis de puto kaj, kiam frostoj malebligis tion, mi degelis neĝon. Lavadon de korpo mi faris ĉefe per neĝo, kiu amase ĉirkaŭis la kabanon. Hejtado okazis per bruligo de ligno en la antikva forno. Estis tre romantike, kompare kun mia antaŭa vivo en studentdomo en la ĉefurbo de Bavario. En tiu kabano, antaŭ mi, longe vivis familio de iama ĉasisto, kiu maljuniĝinte translokiĝis al la urbo, en kiu mi devis ĉiutage esti en mia oficejo.

Ĉiutage mi vivis en du mondoj: la moderna kaj la malnovstila. Estis tre interese fari komparojn. Kiam falis multe da neĝo, mi ne povis veturi per mia aŭtomobilo al mia oficejo kaj mi devis skii ĝis kolegoj per neĝforĵetilo liberigis la vojon, kio ofte pluajn tagojn daŭris, ĝis ili atingis la kabanon.

Por mia naskiĝdatreveno komence de decembro, vizitis min subite multaj nekonataj personoj, kunportinte multe da valoraj donacoj. Tiuj personoj venis per noblaj Mercedes – BMW aŭ Porsche – automobiloj. Mi tre miris kaj ekĝojis, kiam finfine mi rimarkis, en la amaso da gastoj, kelkajn amikojn miajn. Finfine la skurila situacio klariĝis. Ĉiuj tiuj riĉuloj (ne miaj amikoj) estis invititaj al iu politikisto (milionulo kaj ĉasisto), kiu havas sian luksan, modernan ĉasistan kabanon kelkdek kilometroj for de mia, kaj ili havis al tiu inviton. Miaj kolegoj liberigis la vojon de neĝo ĝis mia kabano. En la malhela nokto la gastoj opiniis, ke ili jam atingis la celon, speciale kiam ili legis informtabulon ĉe mia kabano „Malnova ĉasistdomo”. Poŝtelefonoj ne ekzistis kaj ne eblis klarigi la konfuzan situacion ĝis kiam venis iu kun mobilpolicsistema telefono kaj klarigis la eraron. Ĉiuj, krom miaj amikoj, forveturis.

Ekestis denove trankvila, romantika vespero sub ĉielo stelplena Tiun,

komence kaosplenan naskiĝdatrevenan, vesperon mi neniam forgesos kaj neniam plu mi estis dum unu vespero traktita kiel grava politikisto kaj milionulo: mi simpla bavara arbaristo. Post kiam la eraraj gastoj forveturis forprenante la donacojn, restis kelkaj malfermitaj boteloj de tre multekostaj drinkaĵoj. Kompreneble, kun miaj amikoj ni malplenigis tiujn kaj verŝajne neniam plu ni havis okazon denove trinki tiom multekostajn drinkaĵojn.



Venis printempo kaj mi forlasis la ŝatatan regionon por eklabori en Bavara Arbaro (germ. Bayerischer Wald) montaro inter la rivero Danubo kaj la ĉeĥa landlimo. Mi ekloĝis en la moderna, deĵora domo de arbaristo. En ĝi estis fluenta akvo, kurento, telefono kaj centra hejtado (per oleo, malgraŭ tio, ke meze en arbaro). Kiam per vento aŭ amaso de neĝo multaj arboj rompitaĵoj blokis la vojon al Regensburg (de romianoj fondita urbo Casra Regina ĉe Danubo), mi telefonis al centralo de arbarposedanto la duko Fürst Thurn und Taxis (fondinto de poŝtelefono; hodiaŭ taksioj tutmonde portas tiun nomon), ke mi travivis la ŝtormon aŭ neĝlavangon, sed mi devas atendi

ĝis oni liberigos la vojon. Post tio mi forŝaltis la telefonon kaj iris reen al lito, por plue dormi kiel urso en vintro.

Kiam en 1802 okazis sekularizacio en Bavario, tiam la Bavara Reĝo forprenis la arbarojn en Bavara Arbaro de monaĥoj kaj iliajn monakejojn en la urbo Regensburg, por doni al la duko Fürst Thurn und Taxis kontraŭ poŝtraĵo de li. Tiel de poŝtisto li fariĝis grandarbarposedanto. La monakejojn la duko transformis al grandega baroka kastelo, kie ekloĝis lia familio kaj ĝis nun vivas. Tie estas ankaŭ la centralo de la arbaradministracio.

En la kastelo, ĉiutage kelkaj centoj da mizeruloj el la urbo ricevas senpage tagmanĝon. Pro mia mizera salajro, ofte mi estis tie, por manĝi la sufiĉe bongustan kaj senpagan manĝon, ĝis kiam oni forĵetis min, pro ofendo de mia ĉefino - Fürstin Gloria von Thorn und Taxis. Iel mi bedaŭris devinte forlasi la belegan urbon Regensburg, sed plue labori kiel preskaŭ sklavo (kun diplomo de arbarinĝeniero) mi ne plu volis.

Tial mi translokiĝis reen al Cambodunum = Kempten, kie mi luis malgrandan kastelon, transformitan al romantika preĝejo, en kiu eblis loĝi.

Mi kuiris, manĝis ripozis kaj dormis (eĉ seksumis) sub la gotika tegmento, plena de murpentraĵoj pri sanktuloj kaj steloj. Tra fenestroj videblis la neĝkovritaj pintoj de Bavaraj Alpoj. Mi kolektadis antikvajn meblojn por ripari kaj vendi. Same mi aĉetadis uzitajn automobilojn por riparo kaj vendo kun gajno.. Tiu kastelpreĝejo estis mia malgranda reĝlando. En la Popolaltlernejo de Kempten, mi proponis kurson de Esperanto kaj subite multaj ekinteresiĝis. Post la unua leciono, mi invitis ĉiujn al mia kastelo kaj ĉiuj, post la vizito, ne plu volis lerni en la lernejo, sed en miaj ejoj.

Mi instruis dum nia komuna kuirado, manĝado en la kavalira salono, sub pentraĵoj pri sanktuloj kaj, dum bela vetero, en la ĝardeno plena de sovaĝfloroj. La kursanoj tre miris, kiam ili estis en mia dormĉambro kun romanikaj murpentraĵoj, kie mi instruis al la kursanoj koncernajn vortojn kiel ekz. „lito”. Sed la liton neniu rigardis, nur la pentraĵojn kaj la Alpojn tra la fenestro, kiujn mi rigardis kutime de mia lito.

Ĉar kelkaj kursanoj estis instruistoj, tial oni informis pri Esperanto en aliaj lernejoj. Tamen, mi ne studis arbaristikon por labori kiel aŭtoriparisto kaj renovigisto de antikvaj mebloj, sed labori kiel arbaristo. Kiam okazis ebleco ricevi postenon de arbaristo dela urbo Sidmaringen, en la belega Naturparko Supra Danubo, mi tuj kaptis la okazon denove eklabori ĉe Danubo.

## Saĝulaj pensoj

*Anton Oberndorfer*

### 55-jaruloj estas aparte optimismaj

Se oni pliaĝiĝas, oni devas sperti dum la kuro de la vivo multajn malsukcesojn. Ĉu en la profesia vivo, kie eble kolego kaptas la deziratan postenon, aŭ se la propono pri grandioza projekto estas malakceptita. Ankaŭ en la privata vivo hejme povas okazi, ke la maljuniĝanta patro estas celo de moko de siaj infanoj. Kaj la domo de la najbaroj ja estas ĉiukaze pli granda, pli bela, pli nova. Sed fine plej forte negative sentiĝas, se oni vidas sin mem en la spegulo de la dormoĉambra ŝranko, kiel la jaroj kaŭzas perdon de fortoj kaj beleco.

Konsiderante tiajn malsukcesojn, la mesaĝo de psikologoj de la universitato de Kalifornio ŝajnas konfirmi tiun negativan vidon. La

esploristoj asertas, ke homoj, averaĝe ĝis la aĝo de 55 jaroj, senŝtupe fariĝas pli optimismaj - kaj ke malsukcesoj, male ol ĝojigaj eventoj, havas al tio mirinde malgrandan influon.

Kiel eblas, ke esploristoj havas tian ideon kiu ja kontraŭas al la vivosperto de multaj homoj? La psikologoj akompanis dum sep jaroj apenaŭ 1200 meksik-devenajn usonanojn. La partoprenantoj en tiu studaĵo estis regule enketataj helpe de normigitaj metodoj, ekzemple pri



vivosintenoj kaj pri pozitivaj kaj negativaj eventoj. La mezuroj por optimismo dis-volviĝis dum la kuro de la vivoaĝo daŭre supren. Ĉe la aĝo de 55 jaroj, ili atingis plafonon kaj poste, senŝtupe, iomete malaltiĝis denove. La diagramo pri optimismo, kiu estis farita surbaze de tiuj datumoj, similas al ebena inversita U.

El tiuj rezultoj tamen ne eblas konkludi, ke la vivo-perspektivo de ĉiu senĝoja pesimisto pliheliĝus ĝis la 55-a


naskiĝdatreveno. La individuaj diferencoj estas grandaj, diras la psikologoj. Eĉ homoj, kiuj estas sufiĉe feliĉaj, aŭ homoj en gvidaj pozicioj, jen kaj jen konjektas, ke ilia persona estonteco alportos nur problemojn, ofendiĝojn kaj kontraŭstarojn. Tio baziĝas je tio, ke la dono de optimismo estas neŝanĝebla ero de personeco. Laŭ pli malnovaj studaĵoj, tute malprecize taksite, la genoj regas je proksimume 25 procentoj, ĉu iu persono tendencas al optimismo.

Unu sola studaĵo kompreneble ankoraŭ ne liveras certan ekkonon. Krome, la aktuala studaĵo sin apogas sur tre speciala provogrupa, nome temas pri meksik-devenaj usonanoj. Sed la rezultoj kongruas kun konstatoj el aliaj studaĵoj. En ili averaĝaj mezuroj por vivokontenteco, memfido kaj bonfarto montras proksimume la saman evoluon laŭ la aĝo, kiel la nun prezentita u-diagramo pri optimismo. La vivo ja ne estas nur serio de personaj krizoj, ĝi ankaŭ plenumas kelkajn esperojn. Kaj tio kunligiĝas, laŭ la kreskanta aĝo, kun pli da aŭtonomio en la persona agado kaj en pli da efikopotenco de la plej multaj homoj. Oni ja tamen estas atinginta kelkajn aferojn kaj oni milde antaŭvidas, ke ankoraŭ povus sukcesi kelkaj aferoj.



Wojciech Osimowicz

### Aleksander Doba kaj Esperanto



Aleksander Doba, la fama pola vojaĝanto, kiu du foje tranavigis Atlantikon en kajako, en sia libro "Na oceanie nie ma ciszy" („Sur oceano neniam estas silento”), en la naŭa ĉapitro, skribas pri sia kontakto kun Esperanto. Li rememorigas, ke dum lernejaj jaroj li lernis kelkajn lingvojn kaj inter ili ankaŭ Esperanton. Li bedaŭas, ke li ne dediĉis pli da tempo al Esperanto. Li kurte priskribas la avantaĝojn de la internacia lingvo kaj deklaras, ke la komuna lingvo tre faciligus interhoman komunikadon dum ekspedicioj, dum liaj vizitoj en multaj landoj.

## Kalendaro

### Popularaj Esperanto-aranĝoj en Pollando kaj en najbaraj landoj en 2019

11.05. 2019	Esperanto-stando dum 23-a Scienca Pikniko en Varsovio ĉe Nacia Stadiono „PGE Narodowy”	Varsovia Filio de Pola Esperanto-Asocio alwamo@wp.pl
23-30. 05.2019	4-a Internacia Majrendevuo Wrocław - Złotoryja	Eŭropa Centro de Interkultura Edukado / informado.eo@gmail.com / Małgosia Komarnicka
23.05. 2019	5-a Internacia Simpozio, Wrocław Temo: Esperanto - disvolvado de homaj personecoj en la etapo de la junaĝo kaj la tria aĝo	Eŭropa Centro de Interkultura Edukado / informado.eo@gmail.com / Małgosia Komarnicka

25-26. 05.2019	7-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj, Wrocław en prestiĝa loko: Filharmonia str. Piłsudskiego 19	Eŭropa Centro de Interkultura Edukado / informado.eo@gmail.com / Małgosia Komarnicka
31.05-02.06. 2019	38-a Pola Esperanto-Kongreso en Łochów	Estraro de Pola Esperanto-Asocio estraro@esperanto.pl
1-2.06. 2019	Kunveno de Pola Esperanto-Junularo en Varsovio	Pola Esperanto-Junularo www.pej.pl
7-18. 06.2019	41-a Ĉebalta Esperantista Printempo en Mielno	Filio de Pola Esperanto-Asocio en Gliwice stanislaw.mandrak@gmail.com
15.6. 2019	Vizito en <i>Sztolnia Dziedziczna</i> - karbogalerio en muzea karbominejo <i>Guido</i> en Zabrze	PEA-filio en Gliwice, Aleksander Zdechlik, aleksander.zdechlik@gmail.com
16.06. 2019	Montara Renkonto Czantoria Wielka en Beskidy Montaro	suchanekj@seznam.cz
26.07.-04.08. 2019	Esperanta stando dum PolAndRock Festival en Kostrzyn ĉe la rivero Odra.	Renkontiĝo por memzorgantoj ene de la granda rokmuzikfestivalo Andi Münchow, rete: andim@gmx.li
27.07.-05.08. 2019	Internacia Junulara kultura Interŝanĝo Pollando – Litovio. 15-a datreveno de membriĝo de ambaŭ landoj en EU	Centro de Interkultura Edukado en Nowy Sącz halinakomar@gmail.com
25.08. 2019	Montara Esperanta ekskurso de monto Szyndzielnia ĝis urbo Szczyrk apud Bielsko-Biała	Filio de Pola Esperanto-Asocio en Bielsko-Biała. Krystyna Zgud karad099@gmail.com
30.08-07.09. 2019	52-a Internacia Esperantista Feriado en Łądek Zdrój	Silezia Esperanto Asocio Teresa Pomorska, pomer@wp.pl
13-15. 09.2019	Esperanto Sur la Strando - 2019 Gdynia – Sopot, temo: "Najbaroj"	Triurba Esperantista Asocio TORENTO torentosopot@wp.pl <a href="https://sites.google.com/site/esperantowsopocie/">https://sites.google.com/site/esperantowsopocie/</a> FB – Esperanto Sopot.pl



20-22. 09. 2019	35-aj Artaj Konfrontoj en Esperanto „Arkones 2019” en Poznań	E-SENCO Kultur-Socia Societo je la nomo Ludoviko Zamenhof en Poznań. <a href="http://www.arkones.org/eo/">http://www.arkones.org/eo/</a>
11-13. 10.2019	43-aj Esperantistaj Preĝtagoj en Częstochowa	Pola sekcio de IKUE <a href="mailto:pomer@wp.pl">pomer@wp.pl</a>
9-11. 11.2019	Esperantista renkontiĝo GRUPE - 23 en Gliwice	PEA, filio en Gliwice, <a href="mailto:stanislaw.mandrak@gmail.com">stanislaw.mandrak@gmail.com</a> aŭ: <a href="mailto:staman@ka.onet.pl">staman@ka.onet.pl</a>
6-7. 12.2019	4-a Esperanta konkurso “Vortbeleco en Esperanto” Wrocław	Eŭropa Centro de Interkultura Edukado / <a href="mailto:informado.eo@gmail.com">informado.eo@gmail.com</a> / Małgosia Komarnicka
13-15.12. 2019	20-aj Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj en Bjalistoko	Bjalistoka Esperanta Societo <a href="mailto:kontakt@espero.bialystok.pl">kontakt@espero.bialystok.pl</a>
27.12-3.01 2020	11-a JES Junulara Esperanta Semajno en Glucholazy.	Pola Esperanto-Junularo <a href="http://www.pej.pl">www.pej.pl</a>

## Popularaj Esperanto-aranĝoj en najbaraj landoj

7.4.2019	Semajna seminario en Ĉeĥa Paradizo pensiono Espero en la vilaĝeto Skokovy	Jindřiška Drahotová, Sadová 745/36, Mladá Boleslav 293 01. Tel: 420 720 652 320 <a href="mailto:drahotovaesperanto@seznam.cz">drahotovaesperanto@seznam.cz</a> <a href="mailto:drahotova@esperanto.cz">drahotova@esperanto.cz</a>
1-9.05. 2019	Esperanto-renkontiĝo Mirinda Lviv - en Lvov, Ukrainio	Volodimir Hordijenko, p/k 35, Kiev-133, UA-01133, Ukrainio. -: tel. +38 (097) 4403172, retadreso <a href="mailto:volodomir@ukr.net">volodomir@ukr.net</a> . <a href="http://aromajalto.ukrainio.org.ua/">http://aromajalto.ukrainio.org.ua/</a>
9 – 12. 05.2019	TEK - Tutslovakia Esperanto- Kongreso - en Liptovský Hrádok, Slovakio	Esperantská Federácia, Februárová 2, SK-958 01 Partizánske, Slovakio. - <a href="mailto:skef@esperanto.sk">skef@esperanto.sk</a>

10-16. 05.2019	Esperanto-Tendaro en Kievo, ETK - Somera tendumado apud ĉefa ukrainia rivero - Dnipro	Ihor Glagolevsjkij, str. Velika Aranaŭtska 24/6, Odessa, Ukrainio. - tourmaestro79@gmail.com
7-10.06. 2019	96-a Germana Esperanto- Kongreso - en Neumünster, Germanio	Deutscher Esperanto-Bund e.V., Sibilo Sible Bauer, Katzbachstr. 25, DE-10965 Berlin. - retadreso: sible.bauer@esperanto.de
6-14.07. 2019	55-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj - en Panevežys, Litovio	Litova Esperanto-Asocio, p.k. 167, LT-44002 Kaunas, Litovio. - retadreso: litova.ea@mail.lt
28.07- 04.08. 2019	75-a Internacia Junulara Kongreso, IJK en Liptovský Hrádok, Slovakio.	Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, TEJO. - Retadreso: ijk2019@tejo.org
17-20.10. 2019	Kongreso de Ĉeĥa Esperanto -Asocio en Brno, Ĉeĥio.	Estraro de ĈEA, náměstí Míru 1, 568 02 Svitavy, Ĉeĥio. - retadreso: cea@esperanto.cz

**Mirinda Lviv - en Lvov.** Esperanto-renkontiĝo, kies celo estas plialtigi la lingvonivelon de partoprenantoj kaj konatigi ilin kun la kultura ĉefurbo de Ukrainio.

**55-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj** estas tradicia esperantista aranĝo, organizata ekde 1959, laŭvice en Latvio, Estonio, Litovio kun riĉa kaj serioza movada, eduka, instrua, kultura kaj ekskursiva programo.

## Oni eldonis

**“Zamenhof w Warszawie”**

**„Zamenhof in Warsaw”,**

Aŭtoro: Roman Dobrzyński

Redaktis: Agnieszka Kajdanowska


Eldonisto: Centrum Ludwika

Zamenhofa, Białystok 2019

ISBN 978-89-922543-7-9


Dulingva: pola kaj angla

Grandeco: 19x24 cm



„Wierszem o Toruniu”  
„Verse pri Toruń”

Redaktis: Romuald Skaliński  
Tradukis: Józef Gąsiorowski  
Eldonisto: Esperanto Societo  
FLAMO, Toruń 2019  
ISBN 978-83-6333-45-4  
Dulingva: Pola - Esperanto  
Grandeco A5 - 15x21 cm



## Forpasis

Kun granda malĝojo mi informas, ke la 20.02.2019 en Piotrków Trybunalski mortis esperantistino **Teresa Książek**. Adiaŭa ceremonio okazis la 25-an de februaro 2019 je 11:30 en ĉetombeja kapelo ĉe str. Cmentarna en Piotrków Trybunalski.

*Remigiusz Fijałkowski*

## El fotogalerio de Andrzej Sochacki

*Andrzej Sochacki*

### 43-a Internacia Junulara Kongreso en Kraków

Jenaj fotoj mi faris dum 43-a Internacia Junulara Kongreso en Kraków, kiu okazis dum tagoj 17-24.07.1987 j. Kongresa temo etis: "Homo kaj civilizaciaj minacoj". En la kongreso partoprenis 1034 kongresanojn.


Ni rigardu ĝian riĉan programon: Ryszard Rokicki - Laborgrupo pri esperantologio, Sandor Revesz – „Tezoj pri Esperanto”, Andy E. Kundli “Solvoj en sociaj rilatoj per Esperanto laŭ ekzemplo de KCE en Chaux-De-Fonds”, Leszek Kordylewski „Lingva problemo de scienco kaj rolo de Esperanto ĉi-rilate”, Prof. Chen Chenru „Tradicia kaj nuntempa medicino”, Lech Kosieniak “Pacaspektoj en la E-movado”, Paweł Grun „Tutmonda naturprotektado” k. a.

La arta programo konsistis el koncertoj, diskotekoj. Ĉiutage je 17.00 horo okazis teatraĵoj: Teatro de kooperativo Verda Monto "Ĉikonioj", Vidva Jerman – „Virino kiu flustris en uragano”, GEJ-teatro - "Pikniko sur la bataalkampo", SEK-a grupo el Zagrebo „El la vivo de insektoj”, "Diablogoj", Pantonima spektaklo „Apokalipso”.

Dum la kongreso okazis ekskursoj al: Oświęcim, Zakopane kaj salminejo en Wieliczka.



Andreo, Elena, Sackey, Eszter ĉe kongresejo.



Diatta Alphonse kantas kaj dancas




IJK Krakovo 1987, Foto: A. SOCHACKI

Kostas Zaharakis gvidas Internacian Koruson. Inter sidantaj: Berit Posthuma, Nagy Imre




IJK Krakovo 1987, Foto: A. SOCHACKI

Festeno en parko Błonie




IJK Krakovo 1987. Foto: A. SOCHACKI



IJK Krakovo 1987. Foto: A. SOCHACKI

L. Lewandowski kun Jan Koszmaluk - prezidanto de TEJO Saito T., Joanna Z., Andrzej Sochacki, Kei S., Ewa M., Eugenia A



IJK Krakovo 1987, Foto: A. SOCHACKI

Lingvan kurson gvidas Janusz Błaszczyk

# 6-a Esperanta Printempo en Szczecin



## NIA FOTOGALERIO



La 23-an de marto okaze de datreveno de "Akcja pod arsenalem" varsoviaj skautoj venis al PEA-sidejo en Varsovio



Jeremiasz Ratajczyk en varsovia E-klubo